La klasika profesoro tre okupis mian tempon; li ja estis vera kankro."

"Mi ne lernis de li" diris ĝemante la Falsa Kelonio. "Oni diris ke li instruis la Ratinan kaj Blekan lingvojn. Ĉu mi estas prava?"

"Tute prava" diris la Grifo, ankaŭ ĝemante, kaj pro la dolorigaj memoraĵoj ili ambaŭ kovris la vizaĝojn per la piedaĵoj.

"Kaj kiom da horoj ĉiutage vi studis en la lernejo?" Alicio faris tiun demandon en la celo kiel eble plej rapide enkonduki novan paroltemon.

"Dek horojn" respondis la Falsa Kelonio "en la unua tago, naŭ en la dua kaj tiel plu."

"Jen tre kurioza aranĝo" diris Alicio.

"*Nu, ligiĝis* kun tiu 'kurioza' aranĝo" aldiris la Grifo "unu tre ŝatata konsekvenco; ĉar en la dekunua tago *nuligiĝis* ĉiuj lecionoj."

"Ĉu vi volas kompreniĝi" diris Alicio tre mirigite "ke en la dekunua tago la lernejanoj havis la tempon tute libera?"

"Certe" diris la Falsturto.

"Kaj kio okazis en la dekdua tago" Alicio vigle demandis.

"Jen sufiĉe pri la lecionoj" la Grifo interrompis ŝin tre firme. "La Falsa Kelonio nun rakontos al vi ion pri la ludoj."

## ĈAPITRO X

### La Omara Kvadr

La Falsa Kelonio profunde ekĝe
postan flankon de unu piedaĵo
Li fikse rigardis Alicion kaj for
sed liaj plorĝemoj dum kelkaj m
la parolojn.

"Li kondutas same kvazaŭ li
la ĝorgo" diris la Grifo kaj tu
fortoj skuoj kaj manfrapoj sur
la oston. Fine la Falsa Kelo
voĉpovon, kaj kun larmoj glitfa
vangoj komencis:

"Eble vi ne loĝis longan temp
(Alicio intermetis 'Mi neniam')
neniam estas prezentita al O
komencis diri 'Mi unufojon g
rapide haltigis sin kaj diris
neniam') — do vi eĉ ne povas i
afero estas la Omara Kvadrilo.

"Mi devas konfesi ke ne'
"Kiaspeca ĝi estas?"

"Nu" la Grifo respondis
formiĝas en unu rangon laŭ la m

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST